

KONFERENCO SES-2019 EN KONTEKSTO DE VIVMEDIA RESPONDECO

Stano MARČEK



Sustainability - Environment - Safety '2019

ANTAŬPAROLO

La vivmedia politiko baziĝas sur principoj de anticipa prizorgemo, preventado kaj forigado de kontaminaĵoj ĉe la fonto, kaj same sur la principo "la poluanto pagas". Kadron de agadoj en ĉiuj kampoj de la vivmedia politiko starigas aktivecoj en kampoj de vivmedia politiko. Ene de EU ili estas integritaj en horizontalaj strategioj, kaj konsiderataj en internaciaj vivmediaj traktadoj. La vivmedia EU-politiko baziĝas sur principoj de singarda preventado, preventado kaj elimino de poluado ĉe la fonto kaj ankaŭ la principo "la poluanto pagas". La anticipa principo estas ilo por direkti riskon, kiu povas esti aplikata, se ekzistas scienca necerteco koncerne la antaŭvideblan riskon por la homa sano aŭ vivmedio, rezulte de iuj agadoj aŭ politikoj.

La principo "la poluanto pagas" estas integrigita en la EU-Direktivo 2004/35 / CE pri mediprotekta respondeco, kies celo estas preventi vivmediajn damaĝojn, kiuj koncernas protektatajn vivspeciojn aŭ naturajn mediojn, akvon kaj grundon, aŭ ilin korekti. Praktikantoj de certaj profesiaj agadoj, kiel ekzemple transportado de danĝeraj substancoj, aŭ agadoj, implikantaj elfluigadon de substancoj en akvon, devas en kazo de prompta danĝero al vivmedio akcepti preventajn sekurigojn. Se damaĝo okazis, ili estas devigataj akcepti koncernajn kontraŭrimedojn kaj pagi la kostojn. Amplekso de la direktivoj estis trioble plilongigita kaj entenas direktadon de rubaĵoj el ekspluatindustrioj, funkciadon de geologiaj deponejoj kaj sekuran esploron de trovejoj kaj ekspluatejoj de petroloj kaj tergaso en maroj.

Ĝenerale validas, ke la kompanio, kiu kaŭzis damaĝon kaj senpere endanĝerigas ekeston de damaĝoj, devas plene kovri la kostojn de preventaj kaj riparaj agadoj. Kompetenta organo ankaŭ povas akcepti la necesajn disponojn mem, sed nur kiel la lastan eblecon, kaj devas certigi, ke la kostoj, kiujn ĝi kaŭzos, estos reprenitaj de la kaŭzinto. La riparon oni atingos, se la kompetenta organo decidos, ke la originala aŭ preskaŭ originala stato estis atingita. Firmaoj devas informi la oficejojn pri ajna "nepra minaco" al vivmediaj damaĝoj, eĉ en kazo, ke ili jam realigis preventajn agadojn. En kazo de damaĝo la kaŭzintoj devas fari praktikajn paŝojn por limigi la amplekson de la damaĝoj aŭ por malebligi plian malboniĝon de la situacio.

Al la ĉefaj defioj kadre de la vivmedio nuntempe apartenas la klimata ŝanĝo, malkresko de biodiverseco, minacoj al nia sano pro poluado, la maniero, kiel ni uzas naturajn fontojn kaj produktado de troaj rubaĵoj. EU solvas ĉi tiujn malfacilajn taskojn tiel, ke ĝi fiksas normojn en sfero de la vivmedio kaj subtenas novajn manierojn de laboro kaj pli purajn teknologiojn. Novaj teknologioj, ellaboritaj en Eŭropo, kiuj estas pli ŝparaj al la vivmedio, povus ankaŭ kontribui al pli alta konkurenckapablo de nia ekonomio, kaj do al kreo de novaj laborpostenoj kaj al financado de la socia progreso. Ekonomio, mastrumado, sekureco kaj la vivmedio de la homo kaj la socio estas estas en rekta rilato. Ĉio, kion havas la civilizita socio, devenas de la naturo, ĉio, kion ĝi ne bezonas, revenas al la naturo en formo de rubaĵoj. Mastrumi kun elementoj de la naturo, kun la naturaj fontoj en produktado, en interŝanĝo kaj konsumado, ni ne lernis ĝis nun. La ekonomia kresko konsumas naturajn fontojn kaj produktas rubaĵojn.

Kiel solvi la malekvilibron inter la individua evoluo de produktado kaj la socia forigado de rubaĵoj, oni traktas malsame en diversaj landoj. La merkata ekonomio konas instrumentojn por reguligi la konduton de privataj produktantoj, korporacioj, per la ŝtato. La merkata ekonomio ne sukcesas plene solvi la problemon de provizado de la loĝantaro per publikaj havaĵoj kaj plene realigi forigadon de la rubaĵoj. Ĉi tiuj estas la du problemoj, kie devas agi en la kreado kaj protektado de la vivmedio la ŝtato, la ŝtataj organoj.

La celo de EU estas redukti la influon de la uzataj fontoj al vivmedio kaj produkti malpli da rubaĵoj, konservante la ekonomian kreskon. Tio signifas uzadi pli da renovigeblaj fontoj (se ilia uzo estas daŭrigebla), pli recikladi kaj pli ekonomie uzi restaĵojn. Iuj el ĉi tiuj prioritatoj estis selektitaj en la sep 'temaj strategioj', kiuj akceptas tegmentan aliron al la terprotektado, konservado de la mara medio, daŭrigebla uzo de insekticidoj, aerpoluado, la urba medio, daŭrigebla uzado de pesticidoj, aermalpurigo, urba medio, daŭrigebla uzado de la fontoj kaj ilia mastrumado kaj limigo de rubaĵkvantoj kaj iklia reciklado. Malsanoj, ligitaj kun la vivmedio, postulas konsiderindajn financajn rimedojn por sanprizorgado, kuraciloj, malsanasekuroj kaj kaŭzas pli malaltan produktivecon, invalidecon kaj tro fruan pensiigon. Ĉi tiuj elspezoj ofte superas la koston de la prevento. Estas klopodo protekti la sanon en laborejoj kaj redukti polucion de la aero, akvo kaj manĝaĉeno el diversdevenaj fontoj kiel plumbo en benzino kaj kemiaĵoj en piloj. Malgraŭ tio apero de malsanoj, kaŭzitaj de vivmediaj faktoroj kreskas. Tamen ni devas plibonigi niajn sciojn pri la komplikaj kompleksaj interagoj inter malpurigaj materioj kaj la homa sano, ĉar ni estas eksapontataj al multaj diversaj malpurigaĵoj, kiuj en siaj kombinaĵoj kreas "koktelan efikon".

Ĉiu socia agado havas sian etikan aspekton, kio signifas konduti tiel, ke la konduto de unu subjekto ne kaŭzu malbonon al alia subjekto. Tio plene validas ankaŭ en la vivmedio de la socio. Tio validas ankaŭ por konduto de unu parto de la socio al la tuta socio, al ĝiaj partoj, sed ankaŭ al la naturo mem, la flaŭro kaj la faŭno. Ne damaĝi, ne malutili al la naturo flanke de la socio apartenas al la bazaj etikaj principoj de la scienco pri la vivmedio, al la praktikoj, kiujn la socio havas al sia propra vivmedio. Nur tiel la homa socio povos ĝui vivon en sana, ne malpurigita, ne damaĝita vivmedio.

La bezono trakti la aktualajn problemojn, ligitajn kun protektado de la vivmedio, sed ankaŭ kun garantio de sekureco en unuopaj ekonomiaj sektoroj, privataj kaj ŝtataj organizaĵoj, landoj kaj regionoj, kreis kondiĉojn por la apero de pluraj fakoj (sur la kampo de informada sekureco, protektado de personoj kaj posedaĵoj, sav-servoj, civitana sekureco, nutraĵa sekureco k.s.) kaj profesioj (sekurec-laboristo, sekurec-gardisto, teknikisto pri sandefendo ĉe laboro, k.s.), kies tasko estas alfronti demandojn por certigi la sekurecon (informan, administran, personan, fizikan, krizan, averia k.s.). Ofte okazas integriĝo de individuaj aliroj kun la celo komplekse solvi la konkretajn problemojn.

En la praktiko ludas gravan rolon por la produktantoj, distribuantoj, vendistoj, sed ankaŭ por la konsumantoj, krom la diversaj markoj, ankaŭ la identigiloj. La identigo servas por ento-rekono en aro de entoj. Certaj normoj klopodas pri unusignifa aljuĝo de la identigilo al la ento. La identigo estas necesa por gardi aŭ sekurigi certan travideblecon kaj unikecon de la identigitaj datumoj. Ĝi helpas orientiĝi en la merkato kaj, en kazo de pozitivaj spertoj, resp. akiro de informo el reklamo k.s., direktas la aĉeton de la konkreta produkto je la kosto de aliaj substituaĵoj. Individua sinteno al la marko ofte, krom la vida kontakto, ankaŭ kombiniĝas kun emocia elemento, ofte kiel spegubildo de la viv-vidpunkto kaj persona sperto. El ĉi tiu vidpunkto havas la tiel nomata simbola pensado, kombinita kun la originala signado de la produktoj kaj servoj, ĉiam pli grandan signifon. En la socia vivo efikas al ni tiuj markoj, kies celoj estas senvorte direkti niajn aktivaĵojn, resp. rektigi nian atenton al la koncerna direkto. Ĝi fidas je fakto, ke la verba maniero de komunikado ne sufiĉas – pro la tempaj, personaj kaj aliaj kialoj.

Identigado de la produktoj fariĝis esenca ilo ne nur por plibonigi efikecon en vico de industria sektoroj trans liveristaj ĉenoj. Gravan rolon ludas kadre de la produkta identigo ankaŭ la teritorio de sekureco kaj la ekologia mediprotektado. Identigo de produktoj estas ŝlosila elemento en la procezo de aŭtomatigo kadre de la produktado, ne nur ene de la produktad-procezo, resp. en konkreta etkomerca



vendejo, sed en la tuta etkomerca sektoro, precipe dum mendado, transporto de varoj, stokado, distribuado kaj fakturado.

La celo de la internacia scienca konferenco "Daŭripovo - Vivmedio - Sekureco 2019" estas informi la fakan kaj akademian publikojn, reprezentantojn de la loka registaro kaj la ŝtata administrado, interŝanĝo de spertoj kaj prezentado de novaj rezultoj en la problemaro de la daŭrigebla evoluo, vivmedio kaj sekureco.

Oni supozas, ke kontribuaĵoj de la konferenco okazigos diskuton kaj pliajn aktivecojn en la esplorado kaj praktiko.

CONTACT ADDRESS

Stano MARČEK

Zvolenská 15/21, 036 01 Martin, Slovakio

Redaktoro de la revuoj *Juna Amiko* kaj *Esperanto aktuell*

Membro de Akademio de Esperanto

Stano.marcek@gmail.com